# kontakto



N-ro 2
Volumo 4/1967

**KONTAKTO - REVUO DE TEJO**

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

**KARAJ GELEGANTOJ,**

esepereble ĉiuj el vi bonorde ricevis la lastan numeron de nia revuo. Fakte estas ja hontinde, ke la unua numero de la jaro eliris nur fine de oktobro, sed la kaŭzojn mi klarigis jam al vi.

Bedaŭrinde krom pro la prokrasto ni devas pardonpeti ankaŭ pro pluraj nekorektaĵoj en n-ro 1/67, kaŭzitajn i.a. per hasta arenĝado. Ekz. mankas ĉiuj bildklarigoj, kial mi ĉi tie donas ilin.

La frontpaĝa bildo montras israelan junulon en kibuco. La portreto sur p. 3 reprezentas fraŭlinon Haas. La foto sur p. 7 montras Jerusalemon, sur p. 8 vi vidas la Natanjan strandon kaj israelajn knabinojn dum la printempa festo. Sur p. 10 vi vidas la bildon de Paul Calle, sur p. 11 tiun de Paul Sample, sur p. 12 tiun de Mitchell Jamieson.

Ĉi tiu numero prezentas al vi tre varian enhavon. La frontpaĝa bildo montras infanojn en la negrokvartalo de New Orleans (Usono). Pri la negro-problemo en Usono parolas la artikolo „Varmega Somero".

Krome ni denove okupiĝas pri problemoj en evolulandoj kaj prezentas al vi grandan mapon de la mondproblemoj. La foto sur p. 3 montras tian „patronon" (grandbienulo), pri kia la koncerna artikolo parolas. Al tiu artikolo, cetere, apartenas ankaŭ la bildo „Furioj" sur p. 18. Tiajn bildojn oni trovas amase en sudamerikaj muzeoj kaj publikaj konstruaĵoj.

**Adresoj**
Redakcio: Stefan Maul, Hubertstr. 2a. D 625 Limburg/Lahn, Germanio (FR)

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp.: Kontakto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Presisto: Drukkerij De Kennemer, Wijkerstraatweg 178, Velsen-Noord, post: Beverwijk, Nederlando

**Prezoj**
Abono: 8 ndl. guld. = 32 steloj (jarabono de minimume kvar numeroj); 2.20 ndl. guld. = 9 steloj (individua numero).

Reklamtarifo: 200 ndl. guld. por tuta paĝo; rabato por esperantistaj entreprenoj.

Bankisto de UEA: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1, Nederlando.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta esperanto. ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra marĝeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Li havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn. Por la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem, kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO kaj de la redakcio.

**ENHAVO**

La Patrono punas ........ 3
Cobham Lernejo Outward Bound ................ 5
La Sorĉformulo de Azamuri 8
Geografio de Malsato .... 10
Nombroj de Mizero ...... 12
Por niaj knabinoj ...... 13
Variacioj antaŭ la onkuloj 13
Serene ................ 12
Longharuloj - La plej lanta junularmovado ........ 15
Varmega Somero ........ 17
Furioj ................ 18

# LA PATRONO PUNAS

**Por kontraŭbatali la batalon kontraŭ analfabetismo.**

**Specialan punon elpensis la grandbienulo por sia servisto Nazario: Por peli „tiujn frivolaĵojn" el la kapo de Nazario, tiel ordonis la patrono, Nazario melkante devas teni urtikojn inter la sitelo kaj siaj nudaj femuroj. La ĉefservisto zorgas por laŭorda realigo de la puno.**


La krimo de Nazario estas „Escuela Radiofonica Populair", la radiofonia lernejo de Ekuadoro.

La indiano Nazario aŭdacis partopreni alfabet-kurson de la radiofonia lernejo. Jen la „frivolaĵoj" elpelendaj. Ĉar la servistoj, kiujn la patrono ĝis hodiaŭ povas trakti kiel servutulojn kaj sklavojn, poste certe ne plu laboregos por taga salarjo de 4,5 sukroj (1 ndl. guldeno) sur liaj kampoj aŭ en lia bovbredejo. Tiel la patrono pensis - logike. Li ankoraŭ pensas tiel, kiel preskaŭ ĉiuj aliaj grandbienuloj (patronoj).

**„LEVIĜU KAMPARANO"**

Same logike li pensas: Se Nazario kaj miaj aliaj servistoj scipovas legi, skribi kaj kalkuli, ili povos legi la danĝerajn novajn leĝojn, kiuj detruas ĉiujn tradiciajn ordojn. Ekz la ekuadora **agrar-reformo, kiun publikigis** ĉi tiu terura polemika revuo de la radiofoniaj lernejoj „Jatari Campesino". Jam la nomo de la periodaĵo, pensas la patrono, estas pura provokaĵo: „Leviĝu kamparano".
Nazario rajtos baloti, kion ne rajtas la 1,5 milionoj analfabe-







**Peza kaj maımoderna estas la laboro surкampe**

toj de Ekuadoro. Kaj, pensas la patrono, Nazario tutcerte ne balotos por nia konservativa partio, kiu provas konservi la malnovan ordon de estroj kaj servistoj.

**NE DIVOLA ORDO**

Plue pensas la patrono - konsekvence: Nazario nu plu kredos, ke ĉi tiu ordo estas laŭ dia volo. Oni ne plu povos simple konsoli lin per atentigo pri la ĉielo kaj tiel laborigi lin tutan tagon por unu pano. Li aŭdos ke eĉ la episkopoj nu plu estas sur nia flanko. Kaj li kredos ilin kaj socialan reformon, ĉar ili ne nur predikas ĝin. Nazario legos en sia Campesino-revuo, ke la eklezio jam unu trionon de sia terena posedaĵo, 20.000 hektarojn, disdonis kaj tie setligis 18.000 kamparanajn familiojn. Tiuj stultuloj, kolere pensas la patrono, donaci kampojn al tiuj netaŭguloj! Kaj pli terure: ili lernos produkti kaj vendi, ŝpari kaj investi kooperative. Tiam ili estos por ni forta ekonomia konkurenco! Ĉar jam la „Inter-amerika Banko por Evoluo" donas kreditojn por tiu granda agrar-reforma projekto. Kaj ĉilana agrarfakulo gvidas ĝin! Sola konsekvenco do por mi, la patrono, helpi min mem per punoj, malpermesoj, maldungoj por deteni miajn indianojn de la vizito al tiuj radiofoniaj lernejoj, la radiko de la tuta malbono!

**INTERNACIA HELPO**

Jen do la kaŭzoj, kial la radiofoniaj lernejoj de Ekuadoro, fonditaj en 1962, ne povas esperi pri helpo el la propra lando. Oni starigis ilin kun helpo el Romo, Belgio, Usono kaj Germanio. 231 lernejoj en 15 el la 19 provincoj ekzistas ĝis nun. Lernejoj? Jen ili: anteno, ricevilo, horloĝo, tabulo, kajeroj, lernolibroj (en lingvoj hispana kaj kveĉua), helpinstruisto, petrolea lampo - ĉi-ĉio en unu el la rondaj argil-pajlaj kabanoj de la kamparanoj. Hadiaŭ partoprenas 6500 indianoj. Kaj legante ili malkovras la mondon, parton post parto. Ili legas pri la konstruado en Israelo, kies registaro kunlaboras kun la ekuadora instituto por agrar-reformo. Ili legas pri la bone funkcianta konsum-butiko en la najbara provinco. Ili legas pri la sorĉistoj, kies mortigaj trompaĵoj ĉesiĝis en la najbara vilaĝo, kie nun kuraca servo de la radiofonio laboras.

**KURAĜO NECESAS**

Jarcenta vivo sub nehomaj kondiĉoj ne akcelis la talentojn de la indianoj, male: multaj talentoj kadukiĝis, subkonsciiĝis. La instruistoj daŭre devas kuraĝigi ilin, la prezidanto de la radio-lernejoj ofte viziti, laŭdi kaj instigi. La prezidanto estas ja episkopo (Proano) loĝante tradicie en "palaco", sed tiu palaco apenaŭ diferencas de indiana kabano.
Ĉu la kvinjara plano realiĝos, ĉu ĝis 1971 vere 7% de la plenkreskintaj analfabetoj estos instruataj, 90.000 kamparanoj en 300 lernejoj? Oni bezonas 6000 instruistojn. 200 ndl. guldenojn kostas la preparo de unu instruisto. Ĉu la internacia helpo garantios la sukceson? Nazario kaj liaj samsortanoj esperas.


# COBHAM LERNEJO OUTWARD BOUND

Montoj, arbaro, rivero kaj la maro — ĉiuj troviĝas tre proksime al Anakiwa apud Queen Charlotte Sound (Reĝino-Carloto Sundo) en Nov-Zelando. Tie staras la Cobham lernejo „Outward Bound", aventura lernejo fondita por evoluigi iniciatemon, memdisciplinon kaj ĉefulajn ecojn en junuloj aĝaj inter 16 kaj 20.
Tie sinsekvaj grupoj de 36 junuloj lernas la bazajn lertecojn de montgrimpado, vivado en sovaĝa arbaro, velboatado, transirado de riveroj, kanotado ktp. Dum tri semajnoj ili vivas kune, kiel teamanoj kaj teamoĉefoj. Ili edukiĝas superante malfacilajn cirkonstancojn aranĝitajn por plene utiligi iliajn plej ecojn.
La Outword-Bound-movado stariĝis en Britujo dum la dua mondmilito por instrui iom da soldateco al junuloj, kies propraj vivoj kaj tiuj de la familio kaj najbaroj eble dependos je la forto kaj fortiko de la karaktero. Nuntempe estas kvin Outward-Bound-lernejoj en Britujo.
La nov-zelanda Outward-Bound-lernejon malfermis dum 1962 la tiama vicreĝo Lord Cobham, kies nomon ĝi portas. Eksstara soldato kaj sportulo li entuziasme subtenis la projekton; oni nun klopadas pri estigo de bona civitaneco pli ol militema lerteco. La financo estas prizorgata de kuratoroj, kaj la administrado de konsilantaro kiu regas la kursojn pere de lernejestro kaj aro da instruis-





toj alte edukitaj en siaj specialaĵoj.
La lernejo estis treege feliĉa rilate la altajn kvalitojn de siaj instruistoj. Tipa ekzemplo estas la al ni preskaŭ legenda majoro Adrian Hayter, kiu dufoje velveturis sole de Anglujo al Nov-Zelando kaj verkis altsukcesajn librojn. Majoro Hayter forlasis la lernejon por estri la nov-zelandan sciencan ekspedicion al Antarkto.



## EL ĈIU SOCIA NIVELO

Oni rifuzas al neniu knabo eniron en la lernejon. Li povas esti proponata de siaj dungintoj aŭ de la gepatroj. Neniu estas elektita pro sia socia nivelo aŭ gepatra influo. La lernejo estas tute sen rasa antaŭjuĝo. Kiom eble, oni akceptas proponojn laŭ la sama ordo en kiu ili riceviĝis, sed la konsilantaro provas havi knabojn el ĉiuj sociaj grupoj en ĉiuj kursoj.
Oni elektis Anakiwa post plena esploro de pli ol 40 lokoj tra Nov-Zelando. Estus malfacile imagi pli bonan lokon. En la nordo de nia suda insulo troviĝas du sundoj, Queen Charlotte kaj Pelorus, kiuj estiĝis antaŭ miloj da jaroj, kiam la lando moviĝis malsupren kaj la maro fluis en longajn valojn. Estas tiom da golfetoj kaj enfluejoj ke, kvankam la distanco de la Cook Strait (Cook markolo) ĝis la plej enlanda punkto estas nur proksimume 45 kilometroj, la tuta marbordo estas proksimume 750 kilometroj.
Anakiwa estis antaŭe unu el la plej popularaj pensionoj apud la sundoj. Ĉar ĝi havis propran kajon kaj alirejon, oni facile adaptis ĝin al la nova celo. Malantaŭe staras arbovestitaj montetoj, kaj la Pelorus kaj Wairau riveroj estas tre proksimaj. Ĝi provizas senfinan okazon evoluigi la mensajn kaj korpajn ecojn, kiuj plej bone taŭgas al la filoj de pionira lando.

## TIPAJ EKZERCOJ

Kiam la knaboj estas en la domo, la taga propramo estas jena: 6.15 h veko; 6.30 h ekzercoj kaj naĝado; 7.30 h matenmanĝo; 8.10 h kontrolo de la lernejestro; 8.20 h levo de la flago kaj preĝoj; 8.30 h instruado — la tri vaĉoj, en kiuj la knaboj enklasiĝis, foriras laŭ siaj diversaj ekspedicioj; 18.00 h mallevo de la flago; 18.30 h ĉefmanĝo; 19.30 h vespera instruado aŭ instrukcio por estontaj ekspedicioj; 21.45 h enlitiĝo. Ĉiun tagon la tri vaĉoj aŭ teamoj foriras laŭ apartaj aventuroj. Eble unu marŝadas tra kruta tereno dense arbarvestita, irante pli ol 60 kilometrojn antaŭ reveni la sekvantan tagon. Alia eble iras per ŝarĝaŭtomobilo kontraŭflue de la Pelorus rivero kaj revenas per kanoto tra akvofaletoj. La tria vaĉo eble velveturas al la enirejo de la sundo kaj reen. Ĉiuj estas dutagaj ekspedicioj. Poste la vaĉoj interŝanĝos la taskojn, ĝis ĉiu knabo spertis vojaĝon per velboato, per kanoto kaj piede.

## KOSTO DE LA PROJEKTO

La starigo de la lernejo, inkluzive de la domo, mebloj, boatoj, ekipaĵo, ŝanĝoj kaj aldonoj kostis proksimume 50.000 pundojn britajn. Al tio aldoniĝis kapitalo de pluaj 50.000 pundoj por ekstraj bezonoj. La kosto de funkciado parte pagiĝas per pago de 40 pundoj de ĉiu knabo — plej ofte pagita de lia dungisto. Oni invitas komercajn firmojn kaj individuojn kontribui al la kaso, donante rekompence la rajton nomi kun antaŭeco siajn dungitojn por kursoj.
La lernejo tute ne konkuras kun iu jam ekzistanta junula organizaĵo, socia aŭ sporta. Ĝi nur donas instruon en ĉefeco super ĉiuj aliaj okazoj de eksterdoma agado haveblaj de novzelandaj junuloj.

tr. R. Dearnley

# LA SORĈFORMULO DE AZAMURI

**CRIS ASDOR**

La afero estis komenciĝinta printempe, kiam sinjoro Friedlinger surprizis sian filon Paŭlo ĉe agado, kiu estis al li neklarigebla. La sepjarulo sidis en la ĝardena dometo sur antaŭlita tapiŝo kaj estis interkruciginta la krurojn laŭ orienta maniero. Levinte la brakojn kun la eksteren turnitaj manplatoj, li prezentis la aspekton de fakiro, kiu estas eniĝinta en profundan mediton. Prokisime antaŭ liaj genuoj kuŝis amaseto da grize blankaj grajnoj aŭ folietoj — la tomata semo, kiun Friedlinger ĵus volis preni.

La knabo rimarkis sian patron. "Jen, nun ili kreskos ĝisĉiele". li diris kaj ekstaris.

"Kia stultaĵo estas tio", grumblis Friedlinger, „kiu kreskos ĝisĉiele?"

"La tomatoj, kun kiuj vi volas fari vian eksperimenton. Mi parolis super ili la sorĉformulon de Azamuri. — Vi ja certe konas Azamuri, ĉu ne?"

"Ĉu mi konas? Absolute ne!" respondis Friedlinger.

‚Azamuri', Paŭlo instruis lin, „estas maljuna sorĉisto. Kiam Konrado iris por vendi la varikoloran bovinon, ĉar ili, li kaj lia patrino, ja devis vivi de io, Azamuri donis al li sorĉ-fazeolojn. Konrado plantis ilin malantaŭ la domo, ili elkreskis kaj plukreskadis, ĝis ili atingis la ĉielon. Samkiel faros niaj tomatoj. Poste Konrado grimpis supren kaj prenis de supre novan bovinon. Ĉu vi tion fakte ne plu scias?"



"Kion? Ha ja.... Ne, mi ne plus memoras. Sed tiuj tomatoj fariĝu pli altaj ol ĉiuj aliaj, ĉar ili kreskos ne en la tero, sed en nutrofluidaĵo. Mi legis pri tio en la Gazeto por Malgrand-ĝardenistoj. Hidroponiko tio nomiĝas. Kaj nun venu kaj rigardu, por ke vi ekhavu aliajn pensojn. Knabo, kiu estas tiel aĝa kiel vi, ne ple havu stultajn fabelojn en la kapo!"



Ekstere en la ĝardeno, sur loko en bela suno, staris ligna trogo. Sub drata reto, speco de kontraŭmuŝa krado kun iom pli grandaj truoj, malhele brilis. "Ĉu tio estas akvo?" demandis Paŭlo.

"Tio estas la nutrofluidaĵo. Akvo kun diversaj kemiaĵoj: azoto, fosforo, kalcio kaj tiel plu." La patro kovris la reton per io, kio aspektis kiel musko. En tion li enmetis la semon kaj superverŝetis la muskon per verŝilo.

"Kaj nun ili kreskos, la tomatoj", flustris la knabo, "ĝisĉiele...."

Ok tagojn poste la unuaj ĝermoj penetris al la lumo. Friedlinger faris, kiel estis legeble en la artikolo ‚Agrikulturo sen grundo kaj fundo': Li pikumis la plantetojn je tiu tago, kiam ili havis la tipan aspekton de tomataj plantoj.

Kaj la hidroponikaj plantidoj ekkreskadis. Ili kreskis rapide — eĉ timige rapide. Baldaŭ ili estis atingintaj la altecon de ordinaraj tomataj plantoj. La malgrand-ĝardenisto kunĉarpentis lataron, kiu povis servi al ili kiel apogilo, ĉar ili ja ne havis ankriĝon en la fundo. La radikoj etendiĝis malsupren en la nutrofluidaĵon kaj aspektis kiel maldikaj blankaj vermoj. Ili bezonis tre multe da fluidaĵo; kelktage la akvospegulo en la ujo malaltiĝis je dek centimetroj.

Kiam la trunketoj estis almenaŭ tri metrojn altaj, ili aperigis la unuajn florojn, sed gaje plukreskis. Ne daŭris longe kaj la "akvotomatoj" — kiel ili estis nomataj de Friedlinger kaj de la mirantaj najbaroj — povis sukcese konkuri kun la alta ĉerizarbo. Je tiu tempo malsupre rondiĝis la unuaj, tiam ankoraŭ verdaj fruktoj.

La akvotomatoj fariĝis vidindaĵo de la malgrand-ĝardena kolonio. Iun dimanĉon aperis la estro de la Ĝardenet-Unuiĝo, sekvata de pluraj sinjoroj, kiuj ĉiuj kondutis tre afable. Ekstere antaŭ la ĝardena krado je neniu tempo de l' tago mankis scivolemuloj.

"Niaj tomatoj fariĝis tiel grandaj pro la sorĉformulo de Azamuri", Paŭlo rakontis al ĉiu, kiu volis aŭdi ĝin. La plej multaj homoj ridis, sed kelkaj kapjesis kaj rigardis serioze — ĉar ili ne volis ofendi la knabon. Kiam la patro foje ĉeestis ĉe tia interparolo, aperis sulkoj sur lia frunto.

"Nun foje aŭskultu bone", li diris al sia filo, "tio pri Azamuri fakte estas vera sensencaĵo! La tomatoj fariĝis tiel grandaj pro la hidroponiko. Se mi ankoraŭfoje kaptos vin kun fabellibro, vi ricevos batojn! Finfine vi jam estas sufiĉe aĝa, por legi ion prudentan!"

Montriĝis, ke la akvotomatoj havis pli mallongan vivodaŭron ol ordinaraj. La fruktoj estis grandegaj kaj devis esti rikoltataj helpe de ŝtupetaro, sed poste la trunketoj velkis kaj rapide sekiĝis, malgraŭ la nutrofluidaĵo en la ujo.

"Des pli bone", diris Friedlinger al si, "do ni kulturos novajn plantojn." Ĝis aŭtuno estis ankoraŭ longa tempo, kaj la sunaj someraj tagoj ne forpasu neuzitaj.

La malgrand-ĝardenisto, nun jam riĉa je spertoj sur tiu kampo, faris ĉion kiel ĉe sia unua hidroponika kulturo. Li plenigis la lignan trogon kun akvo, aldonis azoton, fosforon, kalcion kaj ankoraŭ plurajn aliajn kemiaĵojn en la preskribita kvanto kaj enmetis la semojn en la malseketan



tavolon de torfmusko. Ili ĝermis en la sama mallonga tempo kaj evoluis rapide kiel ĉe la unua fojo, nur — ili ne plu fariĝis tiel grandaj. Estis tute ordinaraj tomatoplantoj, kiuj jen elkreskis el la ujo, kaj ili diferencis per nenio de siaj samspecanoj sur firma tero.

Friedlinger hirtigis siajn harojn. Li ne povis dormi, lia reputacio kiel fakulo pri hidroponiko estis en danĝero. Dum tutaj noktoj li cerbumadis, ĉu li ne faris ion malĝuste. Sed utilis nenion, li ne trovis eraron.

Ankoraŭ antaŭ ol la tomataj fruktoj de la dua kulturo estis ĝuste maturiĝintaj, li elŝiris la trunketojn kaj semis la trian fojon. Ĉifoje li estis aĉetinta la semon en tri diversaj magazenoj kaj ĉiam postulinta la plej bonan.

La rezulto de la tria kulturo diferencis per nenio de tiu de la dua....

Friedlinger estis malespera. Li videble malgrasiĝis kaj neglektis la ĝardenon. Ĉiame li staris antaŭ la ligna trogo kaj fikse rigardis al la alta lataro, kiu nude kaj kalve konturiĝis de la ĉielo. La tomataj plantoj sube per tio ne pligrandiĝis. Tamen la kulpo certe ne povis esti ĉe la nutrofluidaĵo aŭ ĉe la semo. La unua tutcerte estis ensorĉita — jes, ensorĉita....!

La malgrand-ĝardenisto ekskuiĝis kvazaŭ krabro estus pikinta lin. Poste li vokis sian filon, Paŭlon, kaj rapide iris kun li en la ĝarden-domon. Tie li mem sternis la ruĝan antaŭlitan tapiŝon. "Eksidu sur ĝi", li ordonis al la infano, "kaj nun faru ĉion tiel, kiel vi faris tiam! Vi ja scias, tion kun via sorĉisto. Jen la semo."

Paŭlo rigardis la patron grandokule.

"Vi sidigu vin kaj diru la sorĉformulon", ordonis Friedlinger, "tiun de Amaduri aŭ kiel li nomiĝas — sed precize tiel kiel ĝi staras en via libreto!"

Jen la knabo ridis, ĉar lia patro postulis de li ion tiel strangan. Kaj li respondis: "Sed, paĉjo, Azamuri ja tute ne ekzistas! Tion vi ja mem klarigis al mi. Kaj sorĉformulon mi ankaŭ ne plu povas diri al vi, ĉar ĝi tute ne staras en iu libro. Tio nur ideis al mi tiam. Cetere mi nun tute ne plu legas fabelojn, sed la 'Robinson' — tiu estas multe pli interesa!"

Tiel okazis, ke en la malgrand-ĝardeno de sinjoro Friedlinger la hidroponikaj tomatoj ne plu kreskis ĝisĉiele. Sed por ricevi science funditan klarigon pri la strangaj okazintaĵoj, Friedlinger skribis al fama scienculo. Ties respondo bedaŭrinde ankoraŭ ne alvenis.


**EL „NEUES ÖSTERREICH" n-ro 228 - 6500 tradukis K. Perko**

# GEOGRAFIO DE



## LANDOJ

- subevoluintaj
- duonevoluintaj
- evoluintaj





# MALSATO

# NOMBROJ DE MIZERO

MALPli ol 40 milionoj el la 60 milionoj homoj, kiuj ĉiujare mortas, elmondiĝas pro malsato kaj ĝiaj sekvoj, kvankam en la malsat-regionoj 80 ĝis 90 % de la homoj laboras en agrikulturo kaj vivas per ĝi. Kaŭzo de ĉi tiu paradoksa situacio: la labor-metodoj tie estas malmodernegaj, sterkado, semoselektado, plantoŝanĝado kaj profitiga brutbredado estas preskaŭ nekonataj aferoj. Tial malgraŭ grandaj streĉoj nur minimumaj rikoltoj.

**MALSATO**

Laŭ indikoj de la Monda Nutra Organizo (FAO) la nutrado en la mondo de jaro al jaro fariĝas pli kriza. En 1970 la deficito de nutraĵoj atingos la sumon de 1,2 miliardoj da dolaroj, en 1980 estos 7 ĝis 10 miliardoj.
Dum la sterkojaro 1963/64 en la mondo oni produktis 38 milionojn tunojn da kemia sterko. El ĝi nur 4 milionoj tunoj estis uzitaj en la evolu-landoj (10 % de la monda uzado), kio estas 7 kg po hektaro kompare al 51 kg en la industriŝtatoj
Malgraŭ la malsatmortoj (110.000 tage) la monda loĝantaro kreskas tage je 150.000, el kiuj 80 % en la malsat-regionoj.
En orienta Azio la homoj vivas per ĉa. 1500 kalorioj tage. La eŭropa homo uzas tiun kvanton jam nur sidante kaj spirante. Se li promenas dum unu horo, li krome bezonas 180 kaloriojn. Nesufiĉa nutrado estas, se la taga kalori-kvanto restas sub 2000. Por esti sana kaj vivokapabla, la homo bezonas tage 3000 kaloriojn.
La plej grava manko estas la besta proteino (ovoblankaĵo). 70 % de la homa loĝantaro suferas pro la sekvoj de tiu manko (korpa kaj spirita laborkapablo, vivopovo de patrinoj kaj infanoj estas malgrandegaj).

**MALSANO**

Malsano en la evolu-landoj preskaŭ ĉiam estas sekvo el la malsato. Ĉa. 300 milionoj homoj malsaniĝas, ĉa. 3 milionoj homoj mortas ĉiujare pro malario.
Unu kvarono de la hinda loĝantaro ĉiun someron estas ne laborkapabla pro malerio, 1 miliono da hindoj mortas jare pro tiu malsano. La jaran produktodeficiton per malario oni taksas je 2 miliardaj germanaj markoj.
Ĉa. 50 milionoj homoj jare malsaniĝas pro tuberkulozo, 5 milionoj mortas pro ĝi.
Ĉa. 10 ĝis 12 milionoj homoj ankoraŭ hodiaŭ estas lepromalsanaj; nur 400.000 el ili estas sub kuracista kontrolo.
Dum unu jaro (1965/66) mortis en la tuta mondo 1326 homoj pro pesto; nur en Sudvjetnamio oni nombris 377, en Ekuadoro 374.

**INFANMORTOJ**

El 1000 vivnaskitaj infanoj mortas dum la unua vivojaro:
400 en Sudameriko
350 en Afriko
225 en Azio
36 en Germanio (FR).
En Brazilo mortas ĉiun minuton unu infano, 1500 dum unu tago, 500.000 dum un jaro. Ĉefkialoj estas nesufiĉa nutriĝo, mankanta kuracista prizorgado kaj ofte epidemia trinkakvo.
Laŭ taksado el la nun surtere vivantaj 900 milionoj infanoj probable 500 milionoj mortos dum la venontaj 15 jaroj pro malsato kaj ĝiaj sekvoj. En Afriko nur la duono de ĉiuj infanoj atingas la 15an vivojaron.

**MEZA AĜO DE MORTANTOJ**


Dum la lasta jarcento la meza mortoaĝo en Eŭropo altiĝis de 30 al 70 jaroj. Laŭ prognozoj de kuracistoj ne estas utopio, altigi eĉ al 81 por viroj kaj 85 por virinoj.
La meza aĝo estas
25 en Egipto
35 en Hindio, Burmo, Pakistano
40 en Salvadoro, Gvatemalo
45 en Bolivio, Brazilio, Kolumbio.

**EDUKADO KAJ ANALFABETISMO**

Oni taksas, ke hodiaŭ ankoraŭ 45 ĝis 55 % de la monda loĝantaro en la aĝo de pli ol 14 jaroj estas analfabetoj, nome 75 % en Afriko
65 % en Azio
45 % en Sudameriko
8 % en Eŭropo.
Pli ol la duono de ĉiuj infanoj en la mondo sub 14 jaroj ne povas viziti lernejon.
Du trionoj el ĉiuj novnaskitaj infanoj en El Salvadoro (Meza Ameriko) estas negeedzaj, ĉar la sociala mizero malhelpas normalajn kaj ordajn geedziĝojn.

**VIVNIVELO**

En Hindio nuntempe meza salajro dum unu jaro estas 448 rupioj (242 germanaj markoj), dum tago do 1,50 rupioj (eĉ ne unu germana marko).
En Ĉilio 6 % de la laborantoj ricevas 28 % el la tuta salajropago, kaj 52 % pli malmulte ol la laŭleĝan minimuman salajron de 3,28 germanaj markoj tage.
En Sudameriko 4 % de la loĝantaro ricevas pli ol 50 % de la tuta enspezo.



Vi devas pli bone maĉi !

# 98 PROCENTOJ

## POR NIAJ KNABINOJ



**Ĉu vi apartenas a ili?**


Junaj fraŭlinoj kaj virinoj volas edziniĝi, tute klare — tiel estis, estas, estos. Sed ĉu vere tiel ĝenerale oni povas aserti tion? En Germanio oni volis scii precize, kiel statas pri deziroj kaj sopiroj de junaj inoj. Do oni — kiel ĉion — esploris ankaŭ ĉi tiun demandon per enketo. Rezulto: 98 % el la demanditaj knabinoj inter 17 kaj 24 jaroj jesis, ke edziniĝo estas por ili fundamento por feliĉa estonteco. Tamen nur 80 % volas havi ankaŭ familion, do infanojn — 1 ĝis 5.
Kaj la motivo? Ĉefis la respondo: „Mi volas havi iun, kiu komprenas min." Jen oni vidas (kaj kelkaj tre brutale diris tion) ke ili ne bone interkompreniĝas kun gepatroj kaj familianoj, ke ili volas laŭeble baldaŭ forlasi la gepatran domon.
Aliflanke la knabinoj preskaŭ ne montris materiajn motivojn, do mono kaj riĉeco ne ludas grandan rolon ĉe la edziniĝ-deziroj. Tamen, ili memkompreneble atendas, ke ili havos modernan komfortan loĝejon, kiu ne kaŭzas multe da mastruma laboro.
Ili preferas labori ekster la domo kaj porti hejmen salajron, kiun ili povas uzi laŭ bontrovo. Realistaj, sobraj knabinoj?
Jes kaj ne. Ĉar samtempe ili revas la malnovan iluzion de la fabela reĝido, kiu forkondukas ilin en multe pli belan vivon — se ankaŭ la hodiaŭa reĝido aspektas tute alie ol tiu el la fabeloj. Sed en ambaŭ kazoj temas pri la miraklo de la granda amo.
Ĉu ankaŭ vi revas? Aŭ kiajn imagojn vi havas?


Renate

**Amanto**

**Fianĉo**

**Edzo**







# Variacioj antaŭ la okuloj

Homoj kun vidmanko ĉiam ekzistis, kaj jam tre frue oni provis plibonigi la vidkapablon per okulvitroj. Sed ĉar oni povis produkti ilin nur unuope, ili estis tre multekostaj kaj nur riĉuloj povis aĉeti ilin. Kompreneble ankaŭ la okulvitroj ne estis tiel bone adaptitaj al la bezonoj de la okuloj kiel hodiaŭ. La optikaj okulvitroj estiĝis nur en 13a jarcento. Niaj bildoj montras kelkajn malnovajn okulvitrojn:
1: ĉa. 1350. 2: el ledo, ĉa. 1400. 3. „pacilo", ĉa. 1600. 4. unua drat-enkadrigo. 5. okulvitroj kun pezigilo (el ĉinio). 6. diademaj okulvitroj, 1797. 7. rimenaj okulvitroj. 8. lorgnette 1825. 9. 1800. 10. unuaj tempiaj okulvitroj 1746. 11. nazumpinĉaj okulvitroj 1860.

# SERENE

Post pluvego sinjoro sendis al la meteorologo de la radiostacio Roma jenan koncizan informon: „Mi ĵus pumpis du kibikmetrojn de via malgrava nubaro el mia kelo."



Kontrabando



„Laŭ mia opinio li estas granda mensogulo. Li asertas paroli perfekte Esperanton, sed mi scias, ke li neniam estis eksterlande."




„Mi mendis la unuan fojon franclingve!"



„Ĉu vi ankoraŭ ne scias, ke ternante vi devas demeti la kaskon ?"

Edzo en Malmö (Svedio) suprizis sian edzinon okaze de la deka geedziĝfesto per aparta donaco: li transdonis al ŝi ĉenon el 224 butonoj, kiujn ŝi malgraŭ liaj konstantaj petoj ne estis alkudrinta.



Plej-vendisto certe estas la anglo Tom Brabook, kiu sukcesis vendi al kamparano posedanta nur unu bovinon du melkmaŝinojn kaj kunpreni la bovinon kiel antaŭpagon.

# LONGHARULOJ

## La plej laŭta junularmovado

Ili estas neflegitaj kaj nekombitaj, portas longajn harojn, drinkas ĉion ajn kio estas alkohola, ne malofte fumas Marihuana-cigaredojn, kondutas kiel ekstersociuloj, nenionfarante staras aŭ kuŝas en stratoj kaj parkoj de grandurboj en tuta Eŭropo.
Siajn vestojn ili plenskribas per protest-vortoj, ĉirkaŭ la kolo ili portas senvalorajn juvelimitaĵojn. Ili nutras sin per almozoj, tranoktas en parkoj, sablokestoj, aŭtokadavroj kaj duonkonstruitaj domoj. Ili ne zorgas pri sia vivo kaj ne strebas al persona posedaĵo, koncize: ili kapablas ĉiel ajn fari nenion ajn.

Peatniks

Rockers

Provos


Gammler

Zazzeroni

Raggare

Mods

Blousons noirs





Temas pri tiuj gejunuloj, kiuj en ĉiu lando nomiĝas alie; „longharuloj", tio estas ilia ĉefa karakterizo okulpfrapa. Kompreneble la karakterizaĵoj estas pliaj. Psikologino nomis antaŭ ne longe: longaj haroj, sovaĝa barbo (se eblas), ĉifonita kaj ŝirita vestaĵo, sen konstanta loĝejo, nutriĝante je la kostoj de la aliaj homoj kaj — ne krimema.

La nombro de tiuj, por kiuj taŭgas ĉi tiu priskribo, estas pli malgranda, ol ĝenerale oni kredas kaj krias. Laŭ freŝdata statistiko ekzistas 100.000 en Eŭropo: 20.000 en Nederlando, 30.000 en Skandinavio, 1.200 en Svislando, 2.500 en Aŭstrujo, 7.000 en Italio, 6.000 en Germana Federica Respubliko, 26.000 en Francujo, 18.000 en Britujo, 3.000 en Ĉeĥoslovakio, 6.000 en Sovetunio 3.000 en Belgujo, 3 en Liĥtenŝtejno. Sed tiuj nombroj estas nefidindaj, ĉar ili enhavas ĉiujn gejunulojn, kiuj portas longajn harojn, tamen vivas en la ordinara socio, do ĉe siaj gepatroj aŭ parencoj, loboras aŭ vizitas lernejon ktp. Do ne temas pri veraj „longharuloj" laŭ supra priskribo. Aŭtentikaj el ili estas malpli, en Germanujo ekz. nur 1000, en tuta Eŭropo nur 6.000.

**Tra la vasta mondo**

La veraj nenionfaruloj simple iras tra la vasta mondo. Sub la brako tion, kio nepre necesas, kelkajn monerojn en la poŝo, ili lasas sin kunporti per aŭtomobiloj kaj eliras ie ajn, kie ĵus brilas la suno aŭ kie ili trovas kunulojn. Kiel la migrantaj birdoj ili aŭtune vojaĝas suden, printempe norden, aŭ vintre venas al la hejma forno.

Kelkaj vagadas plurajn jarojn tra ĉiuj landoj de Eŭropo, aliaj nur dum unu somero. Multaj jam komencante tiun vivon havas tre precizajn imagojn, kiam ili denove laboros en ordinara profesio kaj ĵetos siajn vagadvestaĵojn en la angulon.

Kio pelas ilin for el la gepatra domo? Laŭ propraj eldiroj, estas la protesto kontraŭ ĉio, kion postulas de ili burĝeca bonkonduto.

**Indiferento**

Tio estas nenio nova. Junaj homoj jam ĉiam emis fuĝi el la „vata mondo" (Helmut Schelsky) kaj fari ion tute „apartan", provi la ekstravagancajn eblecojn vivadi.

Hodiaŭ, en la epoko de la aparato kaj de la aparatoj, la junularo preferas skeptikon al sentimento, malfidon al kredemo la longharuloj ne ploras; ili eĉ ne ridetas; ili estas tutsimple indiferentaj pri ĉio



**Longharulo Beethoven**

Sian proteston kontraŭ la restarigo de mondo kaj voloroj hieraŭaj manifestis — certe malgranda aro de — la gejunuloj post la mondmilito diversmaniere: Barbjunuloj svarmis el la Novjorka antaŭurbo Greenwich Village kiel „Peatniks" en la tutan mondon. En Amsterdamo „Provos" proklamis politikan anarĥismon. En germanaj urboj „Halbstarke" stratbatalis kontraŭ la polico. En Parizo la „Blousons noirs" ekzercis sin en batado kaj rabatakoj. En la strandbanejoj de Sudanglio interbatis sin „Mods" kaj „Rockers". En Romo turistoj fuĝis antaŭ la „Zazzeroni". En Svedujo oni devis batali kontraŭ la krimulaj „Raggare". Kaj eĉ en Moskvo, kie tiaj kapitalistaj modaĵoj estas primokataj, komsomolanoj portis longajn harojn.

Sed nun venis la dua generacio, la lantuloj kaj indiferentuloj. Ili ne ribelis, ili ne revoluciis. Ili ekkuŝis. Ili ne cerbumis kaj ne interbatis. La junaj herooj estis lacaj. Ili fondis la plej lantan junularmovadon de ĉiuj tempo: la nenionfaradon.

Certe la modesta volo, fari nenion, esti libera kaj sendependa, radikis ne malofte en la nekapableco ankaŭ ne havas gepatran demon, kiu estas en ordo. Enketo montris, ke granda nombro eĉ ne havas gepatrojn.

Sed por la plimulto inter ili la mondvaga nenionfarado estas tio, kio por antaŭaj generacioj estis la migro-lerno-jaroj.

Kaj ne malmultaj ankaŭ kondutas (vidu suprajn nombrojn) tiel semajnfine: „Vendrede mi fariĝas alia homo. Mi renkontiĝas kun aliaj, ni festas festojn laŭ nia gusto. Ni petolas."

**Profesiuloj**

Petoli, jen estas la malfacilaĵo. Baldaŭ oni ne plu povis distingi, kiu estas vera vagulo kaj kiu nur kondutis tiel. Ili mem distingas klare inter „profesiuloj" (dum jaroj), "duonuloj" (dum sezonoj) kaj „nubluloj" (jen kaj jen). Ĵeti ilin ĉiujn en unu poton kun vagabondoj ne estas ĝuste.

Sed la profesiuloj fakte estas nur tiuj, pri kiuj oni atentu, kiuj vere apartenas al tiu movado — aŭ nemovado, kiel vi volas.

Kaj da ili fakte estas ege malmultaj. Aŭ ĉu vi jam vidis unu? Aŭ ĉu vi mem estas? Aŭ ĉu volas esti? Kio mankas al tiu plej lanta movado, estas ideologio. Sed ŝajne ĝiaj anoj kredas, ke ne havi ideologion jam estas ideologio . . . .

F. F.

# VARMEGA SOMERO

**En antaŭa numero ni raportis pri la historio de la negroj en Usono („La nevidebla geto"; n-ro 4/66). Ĉi-somere denove okazis kravaloj en Usono, okazis tio, kion oni nomas „varmega somero", ja laŭ Robert Kennedy ĉi tiuj ras-kravaloj estis pli teruraj ol la civila usona militio.**

Ke tiuj kravaloj estiĝis ĉefe el la senpacienco de la mizera negra junularo, kiu ne estas kontenta pri la „neperforto" de negro-gvidantoj kiel M. L. King, kiu ne fidas la promesojn de politikistoj, kiu ne kredas pri la iom-post-ioma pliboniĝo de la cirkonstancoj, kaj kiu — last not least — estis stimulita per radikalaj negro-gvidantoj, tion ni scias.

Sed ke tiu scio ne povas klarigi ĉion, ni ankaŭ scias. Fakto ĉiukaze estas, ke la usona registaro elspezas jare (kiel diris M. L. King) 500.000 dolarojn por mortigi unu nordvjetnamian soldaton, sed nur 53 dolarojn por helpi mizerulon en Usono.

Fakto ankaŭ estas, ke la helpemaj blankuloj ofte estas timemaj kaj senkuraĝaj kaj — denove laŭ King — fidas pli al ordo ol al justeco.

La usona registaro faras ion batalante kontraŭ la mizero, sed tio ne sufiĉas — precipe, se oni komparas la suprajn nombrojn! La „agado" malsanas je tro multa planado kaj tro malmulta realigo. Tiel ekzistas tre fundaj sociologiaj studoj kaj statistikoj pri la situacio de la usonaj negroj — sed kion ili helpas, se oni ne tiras la konsekvencojn?

Aliflanke, de hodiaŭ ĝis morgaŭ oni ne povas solvi la gigantajn problemojn hereditajn el la pekoj de la pasinteco.

El la 200 milionoj usonanoj ĉa. 21 milionoj estas neblankaj, do ĉa. 11 % de la loĝantaro. La negra loĝantaro enorme povis plibonigi sian situacion dum la lasta jardeko: La meza familia enspezo de la negroj, momente ĉe 4000 dolaroj jare, dum la lastaj ses jaroj kreskis je 24%, tiu de la blankaj familioj (meze 7170 doloroj) je 14 %. Ĉiu kvina negrofamilio disponas pri pli ol 7000 dolaroj jare( apartenas do al la meza usona socio. 9 el 10 negrofamilioj posedas televidilon, du trionoj lavmaŝinon, pli ol la duono propran aŭton.

En la profesioj de dungitoj kaj vendistoj oni konstatis kreskon de 38 % de negroj inter 1950 kuloj. En la meti- kaj faklaborkuloj. En la meti- kaj fakliboristaj profesioj la kresko ĉe negroj estis 46 %, ĉe la blankuloj 13 %. En 1960 56 % pli da negroj ol en 1950 havis gvidajn poziciojn (blankuloj 27%).

Depost 1940 la nombro de negroj kun akademiaj gradoj duobliĝis ĉiun jardekon; en teknikaj kaj akademiaj profesioj hodiaŭ laboras 130 % negroj pli multe ol en 1957. La nombro de negraj advokatoj kreskis de 1950 je 50 %. Nun studas en kolegioj kaj universitatoj 300.000 negroj.

Sed samtempe krestas la nombro ĉe la suba fino de la skalo, kie staras la nelernintaj negraj laboristoj, por kiuj fariĝas pli kaj pli malfacile, trovi laboron kaj homindajn loĝejojn.

Senskrupulaj domluantoj eluzas la mankon de loĝejoj postulante por plej teruraj „loĝejoj" samajn luprezojn kiel por luksaj novkonstruitaj loĝejoj.

Inter 1940 kaj 1960 migris pli ol 3 milionoj negroj — pro la teknikaj ŝanĝoj en la agrikulutro, pro pli altaj salajroj en fabrikoj — el la sudaj en la nordajn ŝtatojn. Jen kelkaj nombroj el industri-urboj: la negro loĝantaro kreskis en Newark je 54.000, en Philadelphia je 69.000, en Detroit je 85.000, en Los Angeles je 215.000, en New York je 232.000!

Relative alta procentaĵo de la negra loĝantaro apartenas al la familioj kun jarenspezo sub 3.000 doloroj: 43 % (ĉe blankuloj 17,1 %). La senlaboreco estas en la tuta lando 3,7 %, sed en la grandaj industri-urboj ĝi estas multe pli alta (en Newark ekz 8,2 %).

Ŝajnas paradokse, ke la kravaloj atingis plorindan kulminon ĝuste dum tempo, kiam la registaro plej multe faras por forigi la mizeron, batalas kontraŭ la kaŭzoj (precipe analfabetismo kaj senprofesieco) per bonaj programoj. Sed psikologie tio estas komprenebla: La programoj de la milito kontraŭ la mizero vekis esperon kaj senpaciencon en la „slums", kie antaŭe estis nur pasiveco kaj rezignacio.

AD





**FURIOJ**

# Perantoj de KONTAKTO

**Argentino:** s-ro J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, OLIVOS (330 pesoj)
**Aŭstralio:** s-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, MELBOURNE, Vic.
**Aŭstrio:** s-ro F. W. Rentmeister, A 1150 WIEN XV/101, Kauergasse 1/1 St. 2, Stg. 15 (58,— Sch.)
**Belgio:** s-ro François Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, ANTWERPEN (115 b.fr.)
**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-II, RIO DE JANEIRO (3400 kruz.)
**Britujo:** Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., LONDON, W.11 (19/— ŝil.)
**Bulgario:** s-ro Simeon Simeonov, G. Genov 22, SOFIA-C (2,— lv.)
**Ĉeĥoslovakio:** s-ro Egon Moravec, U družstva Ideál 11, PRAHA 4-Pankrác (32 Kčs)
**Danlando:** s-ro Søren Andresen, Friggsvej 10 st.tv., FREDERICIA (15,50 d.kr.)
**Finlando:** s-ro Joel Vilkki, SOMERO (7,10 f.mk.)
**Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 rue de Chabrol, PARIS 10 (11 NF)
**Germanio (FRG):** s-ro Reinhard Haupenthal, 6603 SULZBACH 1, Am Bahndamm 12 (8,90 g.mk.)
**Germanio (GDR):** s-ro Hans Eichhorn, 83 PIRNA, Großsedlitzer Str. 54 (8,90 MDN)
**Greklando:** s-ro S. Sakellaropulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, ATHINE (66 dr)
**Hispanio:** s-ro R. Molera, Sta Joaquina de Vedruna 13, MOYA, Barcelona (160 pes.)
**Hungario:** Hungara Esperanto-Junularo, Kenyérmezö u. 6, BUDAPEST VIII (52,— ft.)
**Irlando:** s-ro J. Addis, Kingston House, Ballinteer, DUBLIN 14 (19/— ŝil.)
**Islando:** Federacio de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, REYKJAVIK (124,— i.kr.)
**Israelo:** s-ro J. Ben Alter, P.O.B. 379, PETAH TIKVA [illegible]d)
**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1400 lr.)
**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyô-ku, TOKIO (800 enoj)
**Jugoslavio:** s-ino Emilja Lapenna, Nova Ves 32/III, ZAGREB (2000 din.)
**Kanado:** s-ro W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., TORONTO 7, Ont. (2,40 dol.)
**Kongo:** Konga Esperanto-Instituto, B.P. 7579, KINSHASA
**Koreo Suda:** s-ro Taekeng Kim, Seoul Myoung-Ji College, SEOUL
**Madagaskaro:** s-ro Eugène Raveloson, B.P. 1678, TANARIVE (300 f.mg.)
**Maroko:** s-ro René Cagnon, 19 rue Pierre Parent, RABAT (11 DH)
**Meksikio:** s-ro F. Azorin, Str. Gualdalquivir 41-E, MEXICO 5 D.F. (28,- pesoj)
**Nederlando:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2 (8,— gld.)
**Norvegio:** s-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, OSLO-Bryn (16,— n.kr.)
**Novzelando:** Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, P.O. Box 181, UPPER HUTT (1,— NZ S)
**Pollando:** s-ro Marek W. Pietrzak, ul. ul. Francuska 5a/3, WARSZAWA (55 zl.)
**Portugalio:** s-ro José Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4 dto., LISBOA (4,— esk.)
**Rumanio:** s-ro Florin Carages, Popa Petre 28, BUCURESTI-9 (32 lejoj)
**Sovetunio:** s-ro A. E. Gonĉarov, p.k. 11, BARNAUL 99 (2,50 rbl.)
**Sudafriko:** s-ro Colin Beckford, P.O. Box 1067, CAPE TOWN [illegible]RG (1,60 rnd.)
**Svedio:** Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, MALMÖ (11,50 s.kr.)
**Svislando:** s-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, 8590 ROMANSHORN (9,70 s.fr.)
**Urugvajo:** d-ro R. Zeballos Morales, FRAY MARCOS (Florida) (50,- pesoj)
**Usono:** s-ro D. E. Parrish, 328 West 46 St., LOS ANGELES, Calif. 90037 (2,25 dol.)
**Venezuelo:** s-ro L. Moulines, Apartado del Este 4845 CARACAS (10,—bol.) )




KONTAKTO

LA REVUO POR BEBOJ KAJ AVINOJ



LA INTERESA REVUO

POR LA JUNULARO

KOLEKTU LA ELDONSERION

# ORIENTO-OKCIDENTO

**eldonatan sub aŭspicio de UEA**

## LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA ŜTONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.; broŝ. 8,50 gld.

2. **RAKONTOJ DE OOGAI**, kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.

3. **LA NAŬZO**, eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.

4. **KALEVALA**, la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.

5. **MARTÍN FIERRO**, iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rimversa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.

6. **REĜO LEAR**, unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.

7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO**, de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

**LA DIA KOMEDIO**, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

**Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj**

**Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.**

**Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando**